

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette
la 21^{an} de Marto 1925

Tre estimata Samideano,

Kiel mi estis feliĉe surprizita ricevante vian P.K. Ĉu estas eble? mi diris. D^{ro} Fousek kiu renaskiĝas!

Mi tute malŝatas entrepreni ion + ne ĝin daŭri, do vi povas imagi kian seniluziigon mi havis kiam vi skribis ke nia 4jara interkorespondo estis finita.

Do, mi dankas vin tut'kore pri via P.K. + la aliajn subskribintojn kiujn mi sendube ne konas.

Mi ricevis peton de korespondo de Fraŭlino Schulhof filino de via mortinta amiko. Ŝi konatiĝis kun mia Meksika korespondanto en Pardubitz en Novembro. Tiu S^{ro} kun kiu mi korespondis preskaŭ 7 jarojn vizitis nin en Oktobro + li multege plaĉis al mi. Li vizitis vian landon, Wien, Krakau, Italujon, la Rivieran, Hispanujon, Francujon + Anglujon + jam revenis Tampicon (Meksikujo) fine de Januaro.

Kiel vi fartas ĉiuj + precipe via Eveto? Estas vere ke mi ne rajtas demandi ion al vi ĉar vi decidis ke vi ne plu korespondos. Imagu ke mi nur demandis tion ĉar mi volis montri al vi ke mi interesiĝas ĉiam al via familio, + ne por havi respondon.

Mia edzo estas ĉiam tre febre okupita. Ho! kia terura profesio ke tiu de advokato tre okupita !!! Tamen li intencas veturi Ĝenevon al la Kongreso + esperas tut'kore vin revidi. Mi ne ankoraŭ aliĝis. Mi ne scias ĉu la Kongresaj aranĝoj por la hoteloj + manĝadoj estos tre taŭgaj pro tiu kaŭzo: Unu el la plej agrablaj allogoj de la Kongreso estas manĝi kun unu la alia en diversaj restoracioj - kaj se oni estos deviga manĝi en sia hotelo, ne estos eble renkontiĝi kun tiuj kiuj oni ŝatus. Mi ne scias kion fari.

Mi iros Parizon je la Pentekosto kun Lucien ĉar li devos ĉeesti la festenon "de Bâtonniers de France" ĉar kiel mi eble skribis, la lastan Oktobron li por la 2^a foje en sia vivo estis elektita "bâtonnier de l'Ordre des Avocats".

Mi ŝatus iri ankaŭ Parizon en Aprilo por renkonti D^{ron} Leono Zamenhof kiu ĉeestos kuracistan kongreson polan. Li ne povos veni ĝis Boulogno pro manko da tempo.

Mia filo grave malsaniĝis je skarlatena febro antaŭ du semajnoj, en Cambrai (urbo en la "Nord" je 7 horoj vagonare de ĉi-tie). Li estis invitita en la familio de juna fraŭlino kun kiu li ekfianĉiĝis!!! + li ekmalsaniĝis + post 6 tagoj, la junulino ankaŭ estis malsana + la patrino flegis ilin ambaŭ. Mi vidis lin dum 3 tagoj sed oni petis ke mi revenu hejmen pro timo ke mi gajnu la febron ankaŭ. Nun ili fartas ambaŭ pli bone. Ni telefonas ĉiuvespere.

Pri tiu fianĉiĝo, mi devas diri al vi ke ili ne edziĝos antaŭ 2 aŭ 3 jaroj. Mia filo estas tro juna, + li devos gajni monon - eĉ tiam ni + la parencoj de la fraŭlino devos helpi ilin dum kelkaj jaroj. Plie, li devos esti doktoro en juro-scienco + tion¹ ne estos eble antaŭ kelkaj jaroj.

Mi multe legas pri tio kion faras + proponas via ministro D^{ro} Benes. Li ŝajnas tiel lerta.

¹ tio

Kiel vi, kiu estas protestanto, ĉeestis predikon de S^o abato Ĉe? Eble li estas Esperantisto. Ĉu plaĉis al vi?

Vi ne estas ankoraŭ urbestro en Pŕelouĉ? Tio certe okazos se ne estas jam.

Kaj la muziko? Ĉiam tiel entuziasma?

Kio ajn estas, dankon por via P.K. kiu pruvis ke vi ne forgesis viajn malnovajn amikojn + kun espero revidi vin en Ĝenevo (pli ol en Wien) mi al vi premas la manon salutante vin + vian Edzinon samideane.

Alice Sergeant

²